

MI JURAS LOJALECON AL LA standardo de Usono, kaj al la respubliko kiun ĝi simboligas, unu nacio, nedivid- ebla, kun Libereco kaj Justeco por ĉiuj.

AMERICAN ESPERANTIST

No. 6, Vol. 56

AMERIKA ESPERANTISTO

I pledge allegiance to the flag of the United States of America, and to the republic for which it stands, one nation, indivisible, with Liberty and Justice for all.



LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKO

Joseph Leahy, General Secretary
Centra Oficejo 1410 N Street, N.W. Washington, D.C. Central Office
J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash., D.C.

Number 6 * * \$1.00 per year--anywhere * * * * 10 c per copy * * April 1942 * *

CANADA, NEW ZEALAND
AUSTRALIA, CHINA.



IN UNITY THERE IS STRENGTH

UNUECO * DONAS * FORTECON

United States A million times cheaper to win the war than to lose it Great Britain

KIEL TROVI NOVAJN MEMBROJN ?



LA PLEJ GRAVA TASKO de ESPERANTO-SOCIETO ESTAS KREI NOVAJN ESPERANTISTOJN . . . kaj gajni ilin por nia paca armeo. Se ili ne fariĝas membroj, ili ne estas valoraj soldatoj. Male ili rapide forĝas la lingvon kaj internan ideon, kaj nia granda laboro kaj peno estas perdita kaj vana!!!

Dum mia unua jaro de prezidanteco EANA kreskis preskaŭ 100%. Dum la lastaj jaroj la kresko estis tro malgranda. En mia sepa jaro mi tre-tre deziras ke EANA faru VERAN PROG- RESON. Estas du ĉefaj metodoj proponataj por gajni novajn membrojn: UNUA METODO: Apelacii kaj peti-peti al ĉiuj klubaj prezidantoj ke ili varbu, varbu, varbu por EANA. Sed la kluboj ofte havas proprajn malfacilaĵojn, kaj mem deziras ricevi monon por la kluba kaso. Tial klubaj prezidantoj malofte energie varbas. Sed la faktoj kaj spertoj en granda lando kiel Usono pravas ke la unua metodo ne estas sufiĉe sukcesa. DUA METODO: Rekta alvoko de la EANA MEMBRARA KOMITATO al ĉiuj konataj gesamideanoj kaj nov-lernintoj pli volonte ol mem peti monon por la nacia asocio. Post multaj jaroj kaj spertoj en multaj landoj, mi ĉiam denove konvinkiĝis ke la dua metodo estas la plej efika, kaj tute ne multkosta por la Asocia kaso. Mi serĉas kelkajn gesamideanojn en diversaj distriktoj de Usono, kiuj estas pretaj labori kun la prezidanto, fidele, sisteme kaj energie laŭ la dua metodo DUM UNU TUTA JARO. La Membrara Komitato ricevos de la Centra Oficejo de EANA ekzaktajn listojn de ĉiuj naciaj membroj, kaj de la lokaj kluboj listojn de la lokaj gesamideanoj. Poŝtkartoj, lerte verkita, flugos al ĉiuj dormemaj gesamideanoj ĝis kiam ili vekigos el la dormo de indiferenteco, per la pago de kolosa sumo de du dolaroj kiom kostas la jara kotizo. Ĉu iu kredas ke estas neblaĵo ke VERA SAMIDEANO povus ŝpari 1/2 cendon (unu cigaredon) tage? La gvidantoj ofertas 25-300 horojn monate de sia valora tempo por la Esperanto movado. Certe ĉiu sincera Esperantisto povas oferi 1/2 tage!!! Sed mi serĉas kelkajn sincerajn gesamideanojn kiuj estas pretaj oferi 1/2 horojn semajne por kunlabori en Membrara Komitato de EANA kaj venki evidentan dormemon de multaj usonaj gesamideanoj. SKRIBU SENPROKRASTE al la adreso: Joseph R. Scherer, 3222 Larissa Drive, Los Angeles, California.



ESPERANTO VIVAS

Aŭstralio.—Lastatempe la samideanoj en ĉi tiu lando restarigis la nacian societeton, Aŭstralia Esperanto-Asocio. La nuna Prezidanto estas S-ro Allan Turner el la ŝtato Viktorio, kaj la Sekretario-Kasisto S-ro George Hillerman el la ŝtato Tasmanio. Du jam ekzistantaj ŝtataj organizaĵoj, tiuj de Okcidenta Aŭstralio kaj Tasmanio, aliĝis kiel sekcioj de A.E.A. En la oficiala organo *La Rondo*, la tuja celo de la Asocio estas deklarita kiel "kunigi la diversajn grupojn en unu grandan asocion, kaj varbi sufiĉe da individuaj membroj por aliĝi al Internacia Esperanto-Ligo". En la sama numero de la gazeto oni raportas pri aktiva Esperanta vivo en Hobart, Melbourne kaj Sydney. Aŭstralio jam kontribuis al nia movado multajn fervorajn laborantojn, el kiuj diversaj vizitis Eŭropon de tempo al tempo kaj ĉeestis Universalajn Kongresojn, kie ili alte tenis la standardon de sia lando.

Britujo.—Kiel jam indikite en ĉi tiu gazeto, la movado restas forta en Britujo kaj montras signojn de nova progreso ĉiuflanke. Lastatempe la nacia Asocio organizis Petskribon, prezentotan al la Brita Registaro kaj pere de ĝi al la registaroj de aliaj landoj, alvokantan al oficiala disvastigo de Esperanto post la milito kiel grava elemento en internaciaj rilatoj, kaj al ĝia enkonduko en la lernejojn. Jam multaj miloj da subskriboj alvenis la oficejon de la Asocio. Kio ajn estos la rezulto de la entrepreno en la dezirata direkto, estas certe ke ĝi jam multe stimulis la britan Esperantistaron kaj intensigis ties propagandan agadon. La plimulto de la subskribintoj estas ne-Esperantistoj, kiuj tiamaniere klare montris sian moralan subtenon de la movado: ili apartenas al ĉiuj sekcioj de la popolo, kaj inkluzivas homojn en gravaj pozicioj en rondoj civitaj, komercaj kaj kulturaj,—ankaŭ (tre signifa fakto) grandan nombron da instruistoj.

Notinda kaj signifplena estas la fakto, ke la nacia radio-organizaĵo British Broadcasting Corporation ("B.B.C."), ĝis nun indiferenta pri nia lingvo, je la 15a de decembro signis la nasktagon de la Majstro por la unua fojo, dissendante mallongan sed trafan resumon de lia vivo kaj la progreso de Esperanto, kun aludo al la granda nombro de Esperantistoj en Britujo kaj ilia kredo ke la lingvo multe helpos en tutmonda rekonstruo kaj interkompreno.

Inter lastatempaj lokaj okazintaĵoj en la lando, menciinda estas Esperanta Ekspozicio organizita de la tre agema Societo en la grava havena kaj industria urbo Bristol, je la kristnaska periodo (vidu bildon p. 3). Ĝin vizitis tre multaj personoj, al kiuj la dejorantaj membroj de la Societo donis informon, instruis koncize per la Cseh-metodo, kaj vendis librojn: la nomojn de lernemuloj oni registris por novaj kursoj. Inter la vizitantoj estis nevo de la Majstro, kaj aliaj samideanoj el Polujo mem kaj Svisujo, Belujo kaj Ĉeĥoslovakujo.

Egiptujo.—De nia Delegito S-ro N. Mahrus en Fayum ni ricevis kuraĝigan informon pri la movado en ĉi tiu lando. En Aleksandrio S-ro Bell gvidas plurajn kursojn, kaj fondis novan Societon kun pli ol 60 membroj: antaŭ ne longe la sama samideano aranĝis kunvenon ĉeestatan de anoj de 12 nacioj (vidu bildon.) En la sama urbo la Esperantistoj lastatempe kontaktis kun dejorantaj milituloj el pluraj landoj, kiuj ĝojis trovi lokajn amikojn. Oni instruas la lingvon en unu el la lernejoj de la British Institute en Aleksandrio. En Port Said, Cairo kaj Fayum la samideanoj daŭrigas laboron por la egipta movado, kiu, diras S-ro Mahrus, "ne nur marŝas sed vigle antaŭeniras".



LA ESPERANTISTA GRUPO EN ALEKSANDRIO

"ESPERANTO INTERNACIA"

LA PROGRESO DE LA HOMO

Satira poemo originale verkita en Esperanto.

de W. MOSELEY
 En tempo la ŝtona,
 Pro viro fripona
 Ne ĉiam regadis konsento;
 Virinon forlevis—
 Li punon ricevis—
 Tre ofte en sama momento!
 Car edzo revenis,
 Ne tion eltenis,
 Kolere ekzercis la forton.
 La kapo krevita,
 De ŝtono batita,
 Stelinto ricevis la morton.

La mondo pli aĝa,
 La homo pli saĝa,
 Armlon pli bonan li trovis.
 Pafarkon pretigis,
 La sagon akriĝis—
 Mortigi distince li povis.
 Kaj nun el la tero
 Fosigis la fero
 Kaj baldaŭ ekbrilis la glavo,
 Ponardo, pikilo,
 Kaj ĉia armilo,
 Kaj forto fariĝis la pravo.

Al granda alteco
 Atingis la speco,
 Feliĉe la pulvon ĝi trovis.
 Tre bela la modo,
 Per granda eksplodo,
 Mortigi kelkope nun povis.
 Per grandaj pafiloj,
 Malgrandaj pafiloj,
 Mortigis sin nun reciproke;
 Sed strange por diri,
 Kaj devas ja miri,
 Restadis la vivo kelkloke!

Nun, alta la grado
 De civilizado,
 Car bombe kaj fajre kaj gase,
 Laŭ modo plej lasta,
 Eksplodo plej vasta,
 Ja povas mortigi amase!
 Kaj ĉiu surtere
 Atendas mizere
 En pecojn blowigan la sorton;
 Kaj tuta homaro,
 Post pena elfaro,
 Ja trovas la pacon—la morton!

Sed jam en ĉielo
 Levigas la stelo;
 Kvinpinta kaj verda ĝi estas;
 Per interkompreno
 Kaj ama sinteno
 La homan fratecon atestas.
 Do lingvon la nian
 Kaj amon la Dian,
 Konstante dissemi ni devas;
 Ĝis venos la horo,
 Troviĝos ja floro—
 La paco pri kiu ni revas.



OUR SINCERE THANKS TO MRS. JAMES F. MORTON
of Paterson, N.J., for her generous donation of Esperanto books from the collection of her late husband. A most welcome addition to our Rental Service. Thank you Mrs. Morton.

PURPOSE OF ESPERANTO; "We have not the least wish to interfere in the inner life of the various nations; we only wish to establish a bond between them. We desire to lay a neutral foundation, on which the diverse races of mankind may peacefully fraternize, without imposing on each other their racial differences." (Zamenhof.)



Kial oni lernas Esperanton?



Ĉu iam, en la historio de la mondo, ekzistis pli da malamo, ol nuntempe? Ĝin pli ol unu lando ŝovinismo surmetas la maskon de patriotismo; por multaj kaj vortoj *paco kaj amo* fariĝas anatemo, kaj oni komencas pli alte taksi naciecon ol homarecon. Kial oni lernas Esperanton? Ĉu por havigi novan ludilon? Ĉu nur por utiligi la lingvon dum vojaĝo alilande? Aŭ ĉu ĝi prezentas idealon sekvindan?

Ĉe la diroj kaj skriboj de Zamenhof ni trovas, ke li ĉiam emfazis la esencan unuecon de la tuta homaro. Ĉu Esperantisto estas malbona patrioto? Al tio la Majstro mem respondis en la Guildhall, London, la 21-an de Aŭgusto, 1907. Li diris:

Kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni Esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj Esperantistoj, kiuj traktas la Esperantismon kiel ideon, predikas reciproke justecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la Esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla, kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro!

Samideanoj! Ni reiru al la fundamentoj de la Zamenhova filozofio. Povas esti, ke "longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj".

Dediĉante nin al nia idealo, ni daŭrigu nian laboron. Se tion ni faros, Ni paŝo post paŝo, post longa laboro, Atingos la celon en gloro.

FRED PARKER KANTO ESPERANTISMA

Kantu ni, fratoj, laŭte kaj fiore:
"Vivu Esperantismo!"
Regu nin plene, dolĉe kaj kore,
Amo, ne egoismo!
For la malamo diable kreated!
For la milito de tio naskata!
Venu la paco al mondo malsata,
Per la Esperantismo!
Antaŭeniru, sankta Afero!
Vin salutas la homoj.
Flugu malpacoj al la infero!
Vi fariĝos nur nomoj.
Esperantistoj el ĉiu nacio,
Semu la semon de mondsimpatio,
Amo nin lumu per beno de Dio!
For la noktj fantomoj!
Dankon al Zamenhof! Vivu la bela
Lingvo internacia!
Brilu surtere, per lumo sunhela,
Amo dolĉa kaj dia!
Ĝin idealo de ĉiu amata,
Alta premio de ni sopirata,
Gloro vizio tutmonde celata!
PACO INTERNACIA!

JOHN TAYLOR.

"British Esperantist" British Esperantist

AL LA FRATOJ.

- | | |
|---|--|
| 1. Forte ni starn, fratoj amataj,
Por nia sankta afero!
Ni bataladu, kune tenataj
Per unu bela espero! | 8. Tras senhalte via laboro
Honeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
Neniam malfortiĝante! |
| 2. Regas ankoraŭ nokto sen luno,
La mondo dormas obstine,
Sed jam levigos baldaŭ la suno,
Por lumi, brili senfine. | 9. Forte ni starn, brave laboru,
Kurage, ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo! |
| 3. Veku, ho veku, veku konstante,
Ne timu ridon, insulton!
Voku, ho voku, ripetadante,
Ĝis vi atingos aŭskultton! | 10. Ni ĝin kondakos ne ripozante,
Kaj nin lacigos nenio;
Ni ĝin raportos, sankte jurante,
Tra l' tuta mondo de Dio! |
| 4. Dekon da fojoj vane perdiĝos
La voko via ridata,
La dekumna altradikiĝos,
Kaj kreskos frukto benata. | 11. Malfacileco, malrapideco
Al ni la vojon ne baros.
Sen malhonora malkuraĝeco
Ni kion povos, ni faros. |
| 5. Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unuj de la aliaj....
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho, karaj fratoj vi miaj! | 12. Staras ankoraŭ en la komenco
La celo en malproksimo, —
Ni ĝin atingos per la potenco
De nia forta animo! |
| 6. Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,
Ĉu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo! | 13. Ni ĝin atingos per la potenco
De nia sankta fervoro,
Ni ĝin atingos per pacienco
Kaj per sentima laboro. |
| 7. Ĉu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentas jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon! | 14. Glora la celo, sankta l' afero,
La venko — baldaŭ ĝi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ĝoje nin benos. |
| | 15. Tiam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa! |

„Nenio krom la Vero povas teni la Veron”.

L. L. ZAMENHOF (1889)

Gives Additional Information About Esperanto.

“Arkansas Gazette”
To the Editor of the Gazette:
After publication of my last letter in your paper, I was showered with the questions about the international language, Esperanto.
It is impossible for me to answer each question separately to each inquirer. I would highly appreciate it if you publish my answer to questions.
The Esperanto-English textbooks in the United States can be purchased from E. A. N. A. (Esperanto Association of North America), 1410 Eleventh Street, N. W., Washington, D. C. Some of them are on sale in Little Rock.
“Fundamento de Esperanto,” by Dr. Zamenhof, is the best complete textbook. It contains grammar, exercises and Esperanto vocabulary in five languages. However, it was published in Europe and due to war, the supply in the United States is exhausted. Therefore, “Esperanto Student” and “Practical Grammar,” by Reed-Kellerna must be recommended. They were published in the U. S. A. and are well adapted to local need.

Esperanto movement is non-partisan, non-sectarian and in the E. A. N. A. one may find members of all religions and political creeds. However, among numerous Esperanto publications, one may find some religious publications published by Catholics, Quakers, Bahaja, etc., by commercial men, by labor unionists, even by some political parties. The main body of Esperanto consists of the broad-minded, intelligent people, good citizens of their community, country and nationality, who realize the great economic, cultural and educational advantages of mutual understanding between inhabitants of our small planet through adoption of the international language.

This year the World war prevented organization of the regular annual Internacia Kongreso de Esperanto and, therefore, this year only National Esperanto congress will be held in such countries as Brazil, Argentine, Mexico and the United States.

Little Rock. F. A. Post.
* * * * *
DETROIT VOKAS VIN DENOVE
* * * * *
Julio 2 3 4 1942
* * * * *



JOKES — TRANSLATABLE AND UNTRANSLATABLE. Here is a story almost clever enough*

to steal a bit of space for itself in an Esperanto journal, whether it has any linguistic angle or not. Jenkins was the owner of a pugnacious goat which had made a nuisance of itself by butting the underpinnings from beneath several pedestrians on the main street of a small town. The mayor called Jenkins to his office and told him he had found a town ordinance under which he (Jenkins) must pay a tax of six dollars on the goat. "Six dollars? Preposterous! Why, that's more than Billy is worth!" "Maybe so, maybe so. But my hands are tied. I must enforce the law, and its wording is very clear and specific." "Then show me the law!" "Read it for yourself. You see this ordinance assesses a special tax for street improvement to be paid by every owner of property a-butting on the main street. The rate of such tax shall be three dollars for each front foot!"

Now, my good reader, when you and I get over chuckling at Jenkins and the mayor, we might stop to consider that jokes and pleasantries fall into two main classes: those whose wit lies in some amusing situation or turn in the thought, and those which startle by some unexpected play upon words, upon words that have a variety of unrelated meanings. All wit-ticisms of the first class can be translated from one language to another without losing any of their sparkle. But a jest of the second class, depending on a pun, is quite generally untranslatable. This is because the tangle of incongruous meanings which often gather around a given word in one language will seldom be found to fit the pattern of any similar confusion of meanings in any other language.

The jokes in Esperanto — and there have been thousands of them — are generally confined to the first type, those depending on the sense and not on puns. To be sure, there are some exceptions, as when a few men were shipwrecked on an unknown island, (our apologies go to Dr. Wendell and his "Sep Ridoj",) and one of them complained of the heat because the climate was "tropika", (i.e., "tropical") Yes, said another man, it surely is "tro pika" (i.e., "too prickly.") Yet in comparison with national languages — which, like Topsy, were never born but "just grewed" — Esperanto is rather limited in resources for puns. Grant it! For does not that particular form of poverty amount to riches on a more serious plane?

In international as well as in personal relations, and most of all in diplomacy, a crying need of the world is for means of utterance so precise and unambiguous in the signification of words that what an expression means to the person speaking or writing it shall be what it seems to mean to the person hearing or reading it. Without making any exaggerated boasts we know that Esperanto in this regard can hold up its head with the best languages on the market! — **IT STANDS ALONE—THE ONLY OFFICIALLY RECOGNISED AUXILIARY LANGUAGE.**

ANTAŭ
Komenci, bone pripensu.
agadi, konu l' aferon.
konstrui, faru la planon.
labori, provu la ilon.
demeti, tuton gustigu.
aĉeti, gajnu la monon.
elspezi, vidu bezonon.
malŝpari, timu mizeron.
promeni, domon ordigu
amuzi, finu la devon.
luktadi, zorgu pri pano.
ordoni, lernu obei.
eduki, studu l'infanon.
paroli, pesu la vortojn.
riproĉi, estu kvieta.
koleri, prenu spegulon.
konfidi, provu l' amikon.
alpreni, ŝargon rigardu.
avidi, ŝatu l' objekton.
suspekti, serĉu la veron.
kulpigi, estu senkulpa.
disputi, sekvon meditu.
procesi, celu pacigon.
kuŝigi, Dion adoru.

E. J. Weemaes

**Nur du lingvojn lernu tuj,
Kaj ne pensu pri la tria:
Estu unu de l' Patroj',
De l' homar' estu l' allá!**

EVERY PUBLIC LIBRARY should have the address of the E.A.N.A. and every Esperantist should see that the Library in his or her locality is equipped to give such information to inquirers—that is where strangers usually look for information about reading matter of all kinds. **HAS YOUR LIBRARY OUR ADDRESS???**


ALL QUERIES ABOUT EXAMINATIONS should be directed to the chairman of the Examination Committee, Prof. Edwin L. Clarke, Rollins College, Winter Park Florida.

MISSIONARIES, ATTENTION! Mark XVI 15: "Kaj Li diris al ili: iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo." How infinitely less difficult would be the task of missionaries if everyone could speak a common language! **STUDY, TEACH and PREACH IT!**

DETROIT VOKAS VIN to get your Congress ticket early. Send your \$3.00 to Sec'y Robt L. Davis, 4321 4th Ave Detroit, Michigan. **MAKE THEM HAPPY.**

**EN VIA PROPAGANDA POR
ESPERANTO ESTU ĈIAM VER-
EMA! LA ESPERANTO-MOVADO
ĜAM ESTAS TIEL FORTA, KE
BLUFON ĜI NE BEZONAS.**

**ALWAYS WEAR THE GREEN STAR
THE ESPERANTO EMBLEM**
Every Esperantist should proudly wear one. Green background* Golden "E" and ball* protected points* Sorew-back fasten* ing, 40c. Safety catch for Ladies wear 50c.*



And here is a real novelty* made by the Kiowa Indians* of Oklahoma. Green and White beads on Leather back with* Safety Catch 35 cents.

P O R - V E N K O

"PRACTICAL GRAMMAR of the INTERNATIONAL LANGUAGE"

A Complete and Scholarly Textbook of Esperanto.



ACETU
USONAJN
SPARAJN
OBLIGA-
CIOJN
kaj
MARKOJN

One well tested by long use--hailed as a MASTERPIECE in 1915 when first edition appeared, now in 4th edition (1938). Single copies only 60¢ Postpaid. Special rates to classes. This book is Pocket Size, 144 pages, stiff green cover. Arranged in TWENTY LESSONS. A typical lesson contains the following items: (a) explanation of points in GRAMMAR and STYLE; (b) Vocabulary of new words; (c) Esperanto sentences to be read aloud, understood, and then translated; (d) Short dialog; (e) English sentences to be rendered into Esperanto.

FOR VICTORY



BUY
UNITED STATES
SAVINGS
BONDS
AND STAMPS

At the end of the book are found two selections from the writings of Dr. Zamenhof, the author of Esperanto; Two Vocabularies, English and Esperanto, covering all words used in the book; and a complete index showing where every grammatical point is treated.

It is highly recommended for "continuation classes", with students who have already laid a ground work of elementary knowledge through studying some smaller, beginners' book--such, for example, as Robbie's "Home Student", (which we are selling in large numbers, at 20¢ postpaid.) REED'S "PRACTICAL GRAMMAR" beside its use for those who have already made a start, is in itself an excellent book for beginners--Splendid for all classes, or for SELF INSTRUCTION. Authoress is a member of WORLD LANGUAGE COMMITTEE

Prologo de "Song of Hiawatha,"
Nia estimata samideano, William G. Adams, el la urbo Seattle, Wash., elektis kaj tradukis la sube presitan elserpaĵon el la enkonduko de la fame konata poemo de Longfellow. H I A V A T A

Ĉiuj birdoj ilin kantis,
En arbaroj kaj kamparoj,
En la marĉoj malĝojemaj.
Se vi plue min demandus
Kiu estis Navadaha,
Diru al ni pri la homo.
La demandon mi repondus
Per la vortoj kiuj sekvas:
En la valo Tavasenta,
En silenta, verda valo,
Apud belaj akvofluoĵ,
Tie loĝis Navadaha.
La vilaĝo indiana
Kušis inter verdaj kampoj,
Inter riĉaj maizteroj,
Kaj proksime la arbaro.
La kantantaj pinoarboj
En somero staras verdaj,
En la vintro staras blankaj,
Kantadante, lamentante.
La kantanto loĝis tie
En silenta verda valo.
Tie kantis li la kanton
Pri heroo Hiavata.

N I F U N E B R A S
CHASE. En Galveston, Texas, julio 1941, D-ro E.D. Chase--rezulto je aŭtomobila akcidento. Aĝa 84, fervora membro de EANA.

HEGER. Brooklyn, N.Y. suferis la perdon de unu el siaj fervoraj Esperantistoj je la morto de Reinhardt H. Heger Jr. Li estis la fondinto la Esperanta Societo de Brooklyn.

NI KONDOLENCAS.



Se vi dirus, nu, el kie
Venas tiuj historioj,
Tiuj belaj tradicioj,
Kun odoroj de l'arbaro,
Kun la roso de la kampoj,
Kun la fumo leviĝanta
El la tendoj indianaĵ,
Kun fluado de riveroj,
Kun la oftaj ripetaĵoj,
Kaj sovaĝaj sonoradoj
Kiel tondro en montaro;
Mi respondus, mi vin dirus,
El arbaroj kaj stepegoj,
El la lagoj de Nordlando,
El la lando de Oĝibvoj,
El la lando de Dakotoj,
El la montoj kaj la kampoj,
El la marĉoj kie paŝtas
Sin l'ardeo, la Suŝuga,
Inter kanoj, inter junkoj.
Mi ripetas ilin kiel
Mi antaŭe ilin aŭdis
El la lipoj de l'kantanto,
Muzikisto Navadaha.
Se demandus vi min kie
Navadaha ilin trovis,
Tiujn kantojn tiel strangajn
Tiujn belajn tradiciojn,
Mi respondus, mi vin dirus,
En la nestoj de l'arbaro,
En la hejmo de l'kastoro
En bisonaj piedmarkoj,
En loĝejo de la aglo.

WE 'FESS UP' deliveries are slow sometimes. Oh well--WAR. Johnny's drafted, so is Bill. All our work is now uphill, So your order, we're afraid, May be still a bit delayed, Still you'll get it, don't be vexed,

Maybe this month, maybe next. Cu la anĝeletej kantas al vi? Vidu la daton. We'll fill your order by & by Je via ano-karto.

THE POPULAR THE AMERICAN MANUAL WHICH FITS THE POCKET AND SUITS THE POCKET BOOK, POCKET DICTIONARY ONLY 25 CENTS

Famous ADAM HIRED, short HAD TIRED, poems: 'EM. FIRED. (Anon.)

" ESPERANTUJO " MAY TAKE PRIDE IN ITS LITERATURE

Most people who have not personally explored the matter fail to realize how extensive and how worth while is the literature, both in lighter and in heavier vein, which has been made available to the students of Esperanto by two generations of our pioneering predecessors in the movement.

As far back as 1931 the library of the British Esperanto Association had in its card catalogue more than 12,700 entries. In round numbers these were divided as to subject matter as follows:

Table with 2 columns: Subject and Count. Includes Philosophy (350), Religion (500), Sociology (900), Philology (1050), Science (650), Technology (1200), Art and Sports (400), Literature (1950), History, Geography, Biography (1850), Esperanto movement (1500), Applied Esperanto (600), Esperanto Language (1600), Miscellany (150).



It is true that not all these items represent full sized books. A portion of them are booklets, pamphlets, and brochures of less than full volume size.

So whenever any member of EANA, or even any beginner in an Esperanto class in your neighborhood, is in conversation with a friend in the general public whose merely casual knowledge has left him to think of Esperanto as only an obscure fad, or as " just one of those things," an opportunity is his for an easy and effective bit of missionary work.

Your work on such occasions as a disseminator of public information will be more effective if you can tell your friend that you personally have read and enjoyed some dozens or scores of these Esperanto books.

AIRPLANES AND WIRELESS ARE IN THE VANGUARD OF SCIENTIFIC PROGRESS

They have practically annihilated the barriers of time and space.

ESPERANTO — THE MOST MIRACULOUS INVENTION OF LINGUAL SCIENCE


Is the "Open Sesame" which breaks down the Babel barriers which keep mankind apart. It fulfills the same functions to mankind as the musical notation does for musicians, signs for mathematicians and flag-signalling at sea for the sailor.

Per unu rideto vi povas Lumigi al iu la koron, Kaj vorto aminda forblovas Ofte de iu doloron. "Brita Esperantisto" 1908.

VARBU VIAJN ESPERANTAJN AMIKOJN POR EANA KAJ IEL NI BEZONAS ILIAN SUBTENON.

" KURAGE ANTAUEN "

Advertisement for 'Your Photo' 1¢ each. Includes details about postage stamps, quantity discounts, and contact information for Leahy, 1410 H St., Washington.



NOTICE TO MEMBERS OF THE "RONDO DE LIBROLEGANTOJ" —
A NINE-STAR GRADE.

When the plan was first initiated in 1937, for providing a series of little milestones, as it were, by which those enjoying the reading of Esperanto books could mark the successive steps of their growing maturity in the field of Esperanto literature, no information was at hand as to how far any of our U.S.A. Esperantists had made use of their knowledge of the language by reading its literature. So at the start only five grades were established in the "EANA ESPERANTA RONDO DE LIBROLEGANTOJ," corresponding to from 100 to 5,000 pages of reading. Soon it became evident that at least some few among us were carrying their acquaintance with their Esperanto book shelf far beyond any of these figures. So a 6-star grade in Rondo de Librolegantoj was

established for 7500 pages and a 7-star grade for 10,000 pages. In less than two years it was found wise to announce further an 8-star grade of membership, for 15,000 pages or more. And now, when the number of members with Eight-Star cards has risen to six, we know that these six members are by no means intending to stop where they are, for they are being led by their continued interest in Esperanto to go on for still further reading. And so — since it is always pleasant to have some goal or milestone still in front of one — it seems best to announce a new, a 9-star grade of the "Librolegantoj," to be awarded when one can report at least 20,000 pages of Esperanto books read by him or her. The only Nine-Star member at the present time will be Mr. Louis Dormont, of Brooklyn, N.Y. It so happens that almost three years ago Sano Dormont sent to the Director of the "Librolegantoj," (Mrs. Frances McDowell, 1416 Allison St., N.W., Washington, D.C.,) a list of the books and booklets he had thus far read which would have satisfied the requirements now being announced for a "9-Stelulo". But not until the present has the time appeared ripe for establishing and announcing this new grade in the Rondo. As for the rest of the half dozen who more recently have reached the milestone of their "15,000th page," we wonder how soon some of them will find it convenient and profitable to pile a further 5,000 pages on the top of their present excursions into the literature? It is not desired that any of us shall become mere "absorbers" of what Esperanto has to offer us. For part of our energies as Esperantists should be given to other fields of activity, such as the winning and the teaching of new Esperantists. But even while doing this we must allow ourselves the pleasure and relaxation of making an occasional further inroad into the treasure house of Esperanto books. Extensive reading is not for selfish personal enjoyment alone, for the reader becomes a monument to the world in proof of Esperanto's serious interest and its value as a department of human culture and effort for world betterment.

NI TRE BEDAURAS. In our summary of "Librolegantoj" Star winners, we noted Miss Helene Wolff, of San Francisco, as a Two-Star, instead of a Four-Star winner. (Tiu officeja knabo estas — evidente — tro juna je la tasko de stenografisto.) So sorry Miss Wolff.

"How I became an Esperantist" is told by many in a recent issue of the "British Esperantist". Lack of space permits us to use only a few of them. Note that a number of 'conversions' were due to discoveries in Public Libraries. Mother and Father also lent a guiding hand in some cases. It would be interesting to hear from YOU: "How It Happened."

6. I was always interested in languages, and my father was interested in Volapük: and when I heard two Esperantists speaking in Hyde Park I took it up.
19. I saw an announcement in a Public Library.
3. I was converted through a book in a Public Library.
4. I heard two taxi-drivers talking in Esperanto, and asked them about it. Then I learnt it.
21. My mother took me to a Universal Esperanto Congress, though I could not speak.
25. Glancing at the shelves of a Public Library I caught sight of an Esperanto textbook, and on looking at it was attracted.
26. I saw a small humorous paragraph in a paper about the Esperanto wedding of an Anglo-Hungarian couple.
22. My mother spoke Esperanto, and there were Esperanto books all over the house.
13. When I was about 14 my father gave me a Scout handbook in which there was a page about Esperanto and a few phrases. It caught my attention.
14. When I married I found an Esperanto textbook and dictionary among my husband's books, and began learning the language. I had previously seen Esperanto paragraphs in papers and cut them out, but had not understood them.
15. When a boy I twice read in the Press about weddings where the bride and bridegroom spoke Esperanto. I wondered what it was, but could get no satisfactory explanation. Some years later I saw Esperanto lessons in World Radio, and was converted.
16. While wandering about in a Public Library I happened to see an Esperanto grammar, and as I was interested in languages I began to read it. I was so enchanted that I went back several times, and gradually finished the book.

BOOK LIST (April 1st)

The first six books are American publications--with no limits on orders--the others being foreign, only a small number on hand--and the possibility of replenishing stock rather remote--when you order a foreign book, mention 2nd or 3rd choice.

- ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie, 10th edition (1938) 27 lessons with keys to each, (Grammar, Pronunciation and Word-formation clearly explained. For CLASS or SELF STUDY) 20¢
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed, 4th edition (1938) 144 pages of grammatical explanations, dialogs and full exercises, both into and from Esperanto. For beginners or advanced students. Suitable for CLASS or SELF-INSTRUCTION. 60¢
FUN WITH ESPERANTO, Prof. C.C. Bristol, Vocabulary consisting of words you wish to use. Time saving devices. Every day conversations. Interest holding. 65¢
EASY COURSE IN ESPERANTO, Karl Froding, The adjective tells its story. 10¢
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Karl Froding, 80 pages of English-Esperanto and Esperanto-English, with essentials of Grammar and Word-Formation. Whole words listed--instead of roots only as in so many others. Worth much more but sells for only. 25¢
ESTU PRETA, George J. Falgier, Esperanto-English Key. A very handy little book. 5¢
ESPERANTO KEYS, Pocket size, English 5¢; Spanish 7¢; Portuguese 8¢; French 6¢.
American-Spanish Esperanto Key. Slightly different from European Spanish. 20¢
GRAMMAR AND COMMENTARY, Major General Cox, An authority the world over for many years. hundreds of explanatory words and phrases. \$1.00
PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, Dr. Ferenc Szilagyi, a very popular course, (illus.) 80¢
ELLERNU, Dr. Szilagyi, a very popular course for advanced students. (Illustrated). . . 65¢
ESPERANTO, INSTRUMENT OF MENTAL TRAINING. A reprint from "EDUCATION" magazine. (This is an able article from the pen of Prof. E.G. Dodge) 5¢ for one; 35¢ for 10; 20¢ for 5.
La Regno de l'Vero-Fabelo por grandaj homoj-El la Rusa, de A.M. Koliner. Leginda, 15¢
PROGRESADO kaj la PASINTECO, Cloth, \$1.00. LA VOJO RETURNE, Paper, \$2.00.
POLIGLOTA VADE-MEKUM de INTERMACIA FARMACIO, Cloth, \$3.00. LA FARAONO, (3 volumes, damaged) 75¢-for the 3. MONUMENTO DE KARLO BOURLET (a collection of articles from "REVUO"--at the time Dr. Zamenhof was its editor--Bourlet was a collaborator) paper 60¢
LIFE OF ZAMENHOF (Translated from the Esperanto original) paper \$1.00. VIVO DE ZAMENHOF by Edmund Privat, paper, \$1.00. KANTARO ESPERANTA, 358 songs-many familiar in all the world, translated and compiled by Montague C. Butler, 60¢. HIMNARO ESPERANTA 50¢
DIVERSKOLORA BUKEDETO, a book of poems, 25¢. KIEL PLACAS AL VI (As you like it) by Dr. Ivy Kellerman-Reed, Cloth 50¢, paper 35¢. ESPERANTO por INFANOJ (Illustrated) 50¢
ESPERO, the Esperanto hymn, with words and music--double sheet, both 11 X 8, one for 15¢ or two for 25¢ (Every class or club should have this item)

PERIODICALS in ESPERANTO and National Languages.

- BE IN THE "KNOW" of Foreign affairs pertaining to Esperanto, by subscribing for some of the following: (still getting through, though somewhat irregular)
"BRITISH ESPERANTIST", in Esperanto and English. Monthly since 1904. Per year 75¢
"O BRASIL ESPERANTISTA", Esperanto and Portuguese. Brazil is noted for its famous writers in Esperanto, of Originals and translations, and its great enthusiasm. Yearly \$1.00

YOUR MEMBERSHIP in the E A N A WILL BE APPRECIATED.

The EANA sends the monthly AMERIKA ESPERANTISTO to each member--and several copies to Foreign Exchanges and many Libraries. It answers numerous inquiries from those wishing to know more about Esperanto activities. It appoints and directs several committees, established for promoting the Esperanto cause in various ways. It sells Esperanto Textbooks and other publications. Holds annual congresses, which promote acquaintance among Esperantists and awakens new enthusiasm.

BY YOUR MEMBERSHIP AND PAYMENT OF DUES, YOU HAVE THE PRIVILEGE OF AIDING IN ALL THIS WORK ON BEHALF OF A HIGH IDEAL.

MEMBERSHIP RATES.

With Amerika Esperantisto \$2.00 and if you wish membership in the International Esperanto League (IEL) also, you can save money by our combination reduced rates:
EANA and IEL, with Amerika Esperantisto and the Jarlibro (Yearbook-encyclopedia of Esperanto) for \$2.75 (save 25c). All the above and the Esperanto Internacia (monthly official organ of IEL) for \$3.75--instead of \$4.00.

The ADDITION of ESPERANTO to your mental equipment will SUBTRACT little from your time, but will MULTIPLY your pleasure and DIVIDE your interests into numerous pleasant fields.

ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, 1410 H Street N-W., Washington, D.C.